riĉigi la ĝeneralan konon de la esperantistoj, kaj por helpi la pludaŭron de tiu tre grava esperantaĵo, kiu aperis jam dum pli ol cent jaroj. Ĝi kostas dudek eŭrojn jare, kaj oni povas mendi ĝin ĉe nia Libro-Servo. Mi ripetas la nomon: "Scienca Revuo", eldonata de ISAE, la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Ĝia redaktisto estas prof. *Rüdiger Sachs* de Germanujo, kiu jam plurfoje vizitis Aŭstralian esperantistojn. Do, bonan kaj interesan legadon en Esperanto.

Marcel Leereveld,
12, Heather Grove, Belgrave South,
AU – V i c t o r i a - 3160, Aŭstralio

Datumbazo da faka literaturo esperantlingva ĉe la interreto: geologio kiel komenco

Danke al ebloj de teksto-serĉado kaj tuja bildigo de koncernaj dokumentoj pere de hipertekstaj ligoj, la interreto enorme rapidigas la laboron kun specialigitaj informoj. Temas precipe pri materialoj destinitaj por malvasta rondo da interesatoj, kiujn presi en gazetoj aŭ elsendi en televido ne estus finance avantaĝa. Tia estas ankaŭ plejparto de la faka literaturo. Multaj ĝis nun valoraj laboraĵoj restas preskaŭ nekonataj, ĉar neniu scias pri ili kaj se jes, estas problemo ilin akiri. Tio avantaĝigas "tutmondigajn" fakajn publicaĵojn, en kiuj estas pli aŭ malpli, laŭ la fakoj, trapuŝata la angla kiel sola internacia lingvo.

Koncerne la fakan literaturon en Esperanto, ni decidis ŝanĝi la situacion per pli granda utiligo de la interreto. La komencon montras la datumbazo de geologia literaturo, lokita provizore ĉe la retejo: http://gchmin.ic.cz/isaeproviz/seznamvse.html. En la tempo, kiam la aŭtoro verkas tiun ĉi tekston, la datumbazo enhavas relative malmultan nenovan literaturon, sed tio rapide ŝanĝiĝos danke al la enkomputiligado de resumoj el malnovaj artikoloj, kion ni devas danki al *Dana Sklenářova.* Se la aŭtoro kongruas, publikiĝas tuta teksto kun bildoj.

Por estonta disvastigo de la datumbazo je aliaj fakoj kaj ĝia taŭga ligo al jam ekzistantaj datumbazoj de "neEsperanta" literaturo estas registrita (provizore ĝis la fino de 2009) domajno: http://isae.info, kie oni kalkulas kun profesia adminisitrado kaj funkciado sen reklamoj. Tio kompreneble kostos certan monon, sekve financado de tia afero fare de unuopulo ne estas memkomprenebla, sed por internaciaj Esperanto-organizoj ĝi ne devus esti problemo. Ni alvokas ĉefe la aŭtorojn, ke esprimus (mal)konteksto kun pub-likigo de tutaj tekstoj de niaj traktaĵoj. Memkomprene ni ankaŭ dankos por kompletigo de informoj precipe pri malnovaj laboraĵoj eĉ por sendaĵo de iuj verkoj (se la aŭtoroj kongruas), speciale se ne temas pri artikoloj en ĵurnaloj Geologio Internacia aŭ Scienca Revuo.

Václav PROCHAZKÁ, Ústav skla a keramiky VŠCHT,
Technická 5, CZ-16628 Praha 6, Ĉeĥio
<vaclav.prochazka@vscht.cz;>

Pro la libereco de la scienco kaj de la publikado

Tre interesa letero aperis en Scienca Revuo de la jaro 2009 sur p. 249. Ĝi estas interesa ĉar sciencisto* skribas ke la evolubiologio ne konvinkas lin "kiel pensanta homo", kaj ĉar la aŭtoro klare donas sian kaŭzon, kiu montras ke li ne komprenas la esencan ideon de evolubiologio. Lia kaŭzo estas, ke la hazardo ne povas krei la ordon kaj kompleksecon, kiun ni vidas en vivantaj organismoj, bestoj kaj plantoj. Tio estas la sama kaŭzo kiel donas Jehovaj Atestantoj kaj la kreadismanoj por ilia rifuzo de la evolubiologio, sed ili estas blindigitaj de ilia religia kredo, kaj ili ofte ne ricevis edukadon pri scienco. La aŭtoro* skribas: "Miaj ĉiutagaj vivospertoj estas la plej forta argumento por tio. Nenie mi malkovras blindajn hazardaĵojn laŭ genieco, planado au kreiveco. En la arĥitekturo, la natursciencoj kaj la medicino oni povas konkludi, konsidere ordon kaj kompleksecon, pli facile certan inteligentan agadon ol hazardon".

Aperas ke la aŭtoro kredas, ke la darvina evoluo temas pri hazardaĵoj videblaj en ĉiutagaj spertoj. Tute ne. Darvina evoluo diras ke hazardaj malgrandaj ŝanĝoj en la kapabloj de organismoj dum tre longa tempo, centmiloj kaj milionoj da jaroj, ŝanĝas la specojn. Tiuj ŝanĝoj, mutacioj nomitaj, fakte okazas en la genoj kiujn gepatroj donas al la infanoj au bestidoj. Plej multaj de tiuj ŝanĝoj ne estas avantaĝa por la nova organismo, sed iuj mutacioj donas avantaĝon en la vivo de tiu organismo, tiel ke ĝi havos pli multajn idojn, kaj tiuj idoj iliaflanke donas la avantaĝajn genojn al iliaj idoj k.t.p. dum jarmiloj. Estas interese kaj ankaŭ bedaŭrinde, ke troviĝas eĉ scientisto kiu ne scias pri tiuj principoj de darvina evoluo. Darvino kaj aliaj sciencistoj observis, ke ŝanĝoj de la specoj okazis dum la jarmilionoj, kaj tiaj ŝanĝoj estas nekontestebla fakto ekde 150 jaroj. Sed la meĥanismo per kiu okazas tio, nome la genoj kaj mutacioj, oni nur iom post iom malkovris precipe dum la jaroj 1870 ĝis 1950 per multaj sciencaj studoj.

Dr. Erik Høg, Skovsoen 23, DK-2880 Bagsvaerd/Danlando
Astronomo. Pensionita de la Kopenhaga Universitato en 2002
<erik.hoeg@get2net.dk>

* La eldona stabo de SR ne konas la profesion de la *Werra-Rundschau*-gazeta aŭtoro, iu s-ro *Alexander Inden* el *Kassel,* Germanujo, kaj ne scias ĉu li estas sciencisto.